# *La forumo de Sao Paulo okazos en Venezuelo*




Karakaso, 16 jul (RHK) La XXV-a renkonti?o de la forumo de SaoPaulo, okazonta en Venezuelo de la 24-a ?is 28- a de julio markos la progreseman vojon bezonatan de la regiono nuntempe, certigis la prezidanto de la nacia asembleo konstitucia, Diosdado Cabello.

Dum intervjuo kun la informagentejo Prensa Latina, la supera reprezentanto de la plenpova institucio, elstarigis ke la internacia renkonti?o okazos en momento  emociplena kaj historie signifa por la sudamerika lando, kiu batalas kontra? tiuj, celantaj malstabiligi la instituciecon.

Li aldonis ke la forumo estas la scenejo favora por montri al la mondo la realon de la nacia teritorio, kiu estas manipulata de la komunikaj korporacioj, kampanjo fortigita depost la ?usa raporto de Michelle Bachelet, altnivela komisiito de UN por homaj rajtoj, kiu prezentis tekston “profunde leza al la digneco de la venezuela popolo”, li asertis.

Li komfirmis partoprenon de delegitaroj el Latinameriko, Vjetnamio, Norda Koreio, Meza Oriento, Afriko kaj Usono, lando el kiu ?eestos 61 delegitoj, inkluzive de la aktivuloj kiuj defendis la venezuelan ambasadejon en la usona ?efurbo.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/196229-la-forumo-de-sao-paulo-okazos-en-venezuelo

**Radio Habana Cuba**